Ateismo

Bulteno de Ateista Tutmonda
Esperanto-Organizo

http://www.gazetoteko.com/ateo/



Antaŭ ol aldoni la sablosakon, Pastro, mi petas ke vi klarigu,
ĉu la inundo estas volo de Dio,
kiun ni kontraŭstaros se ni haltigos la akvon,
aŭ
ĉu Dio volas ke ni haltigu la akvon,
ĉar Li ne povis, aŭ ne volis, eviti ĉi tiun teruran katastrofon.

Nº 14 Majon de 2012

Vorto de la prezidanto

Jen la printempa numero de Ateismo por la jaro 2012. Ĝi estas evidenta, kaj eĉ vivanta atesto pri tri konstatoj :

. pli flue alvenas la kontribuoj el diversaj fontoj, kaj videble de novuloj. Esperante ke tiu tendenco estonte firmiĝos, mi momente dankas la kontribuintojn ;

. jam senteblas la graveco de la fondo de la Internacio de la Liberpenso en Oslo, someron de 2011. Diversaj tekstoj estis proponataj por tradukado en Esperanton, el la angla, el la hispana kaj el la franca. Estas grave ke nia lingvo regule aperu por laboraj dokumentoj de tiu nova internacia instanco ;

. ekfloras ie-tie iniciatoj por teksi rilatojn kun la neateista esperantista mondo, aŭ eĉ pli bone kun la ateista neesperantista mondo. Ne hezitu raporti pri aliaj tiaj iniciatoj, ĉu estintaj, ĉu estontaj. Ĉi poste du el ili estas prezentataj. Ili okazis en Italujo kaj en Francujo.

Tri pozitivaj konstatoj do, kiuj estas, kvankam evidente modestaj, tamen sufiĉe notindaj kaj gratulindaj. Mi estas certa ke ĉiu el vi siaflanke povos partopreni kaj riĉigi tiun evoluon.

En aprilo 2012, Sat-Amikaro kongresis en Chateauroux (Francujo), kaj ĉi-kuntekste okazis la tradicia bankedo de la regiona Liberpenso. Duan jaron tiu emo al interrilato inter ambaŭ movadoj tiel konkretiĝas. Ĉi-jare mesaĝo, nome de ATEO estos legata (ambaŭlingve) dum la bankedo (vidu ĉi-poste).

Cetere, budo de ATEO videblos okaze de la kongreso de Espéranto France.

Kompreneble, por tiuj el vi kiuj kongresos en Hanojo, vi povos

viziti la budon kaj partopreni la tradician kunvenon de ATEO. Ĝi estas bona okazo interŝanĝi spertojn kaj ideojn (kaj eĉ remembriĝi por 2012). La ĉi-jara temo de la debato estos :

"Ĉu libera merkato por vendistoj de senbazaj kredoj ?"

Ĝin antaŭ-pripensu !

Bonan legadon !

Christian Rivière

Atheist Alliance International

Ateista Alianco Internacia estas tutmonda federacio de ateismaj kaj liberpensaj grupoj kaj unuopuloj. Ĝi celas plifortigi ateismon tra la mondo per kunlaborado inter tiaj asocioj kaj starigo de novaj, precipe en evolulandoj. Grava parto de ĝia laboro estas edukado pere de sia revuo, kaj per okazigo kaj subteno de konferencoj. Krome ĝi batalas kontraŭ diskriminacio kontraŭ ateistoj kaj liberpensuloj.

Mesaĝo de Tanya Smith, prezidanto de Atheist Alliance International

Saluton, ateistaj esperantistoj ! Kiel multaj anglalingvanoj mi estas ne tre lerta pri aliaj lingvoj (kiel embarase !), do mi estas kontenta, ke ATEO pretas traduki ĉi tiun mian saluton. Mi komprenas, ke la ĉefa celo de Esperanto estas faciligi komunikadon kaj kunlaboradon inter homoj de malsamaj fonoj, kun la intenco, ke tio vartos bonvolemon kaj harmonion sur nia malgranda planedo. Tio estas nobla aspiro, kaj tiuj esperantistoj, kiuj samtempe estas ateistoj, povas kompreni, ke Atheist Alliance International havas similajn celojn. Kontraŭstarante la religiojn kaj ilian privilegian lokon en la socio, ni strebas al sekulara mondo, en kiu ĉiuj homoj estos traktataj juste, kaj kiu finfine estos pli paca. Por la bonfarto de ni ĉiuj, mi esperas, ke la klopodoj de ambaŭ niaj asocioj kontribuos al la nasko de pli bona mondo.

tradukis A.Löwenstein

Mesaĝo de ATEO kadre de bankedo de loka Liberpenso kaj de la kongreso de Sat-Amikaro en Chateauroux (Francujo) de la 7a ĝis la 10a de aprilo 2012 :

Karaj samideanoj, karaj ateanoj, karaj liberpensuloj,

Nome de Ateista Tutmonda Esperantista Organizo (ATEO), mi sendas al vi miajn plej korajn salutojn, kaj ĉefe bonan apetiton.

Mi esperas ke via kunesto kaj la sekva kongreso utile kontribuos al niaj sendube komunaj filozofiaj kaj sociaj celoj, nome :

. disvolvi Esperanton por provizi la popolojn per efika ilo de komunikado ;

. certigi la rajton pensi libere ;

. defendi la absolutan disigon de la ŝtato disde la eklezioj ;

. agadi por la paco kaj rifuzi la militojn de la kapitalismo.

Tro longe la socia kontrakto estis inspirita de dio sen justeco ; venis momento ke ĝi estu inspirita de justeco sen dio (*).

Neniu publika groŝo por la religioj !

(*) frazo de Sébastien Faure (1858-1942), fama liberpensulo

Esperanto en la Kongreso de la franca Liberpenso

la 22an de aŭgusto 2011

Esperanto vere ĉeestis en la kongreso de la Libera Penso en Foix kun prezenta tablo instalita de kvar geesperantistoj.

La delegito de SAT-Amikaro kaj de Ateista Tutmonda Esperantista Organizo estis Henri Graven. Li renkontis S-ron Marc Blondel, prezidanton de la Liberpenso, kaj gratulis lin pro la fakto, ke li estas inter la unuaj subskribintoj de la petskribo por Esperanto en la bakalaŭro.

Dum tiu kongreso, oni rikoltis cent tridek kvin subskribojn, el kiuj tiun de la urbestro de Foix.

La Esperantlingva delegito prelegetis la ĉi-sekvan tre aplaŭditan intervenon en la franca (eble venontjare en Esperanto ...) Ĉi-poste la interveno :

Mi alportas la fratan saluton de la Amikaro de Sennacieca Asocio Tutmonda kaj Ateista Tutmonda Esperanto Organizo (ATEO).

Mi ne insistos pri tiuj asocioj, ĉar estas resumeto pri iliaj agadoj en la paĝo14ª de la unua aparta numero de « La Raison ».

La asocioj, kiuj disvolvas Esperanton en Francio organizas petskribon por postuli oficialan agnoskon en la eduka sistemo de ĝia enkonduko en la liston de eblaj elektoj en la bakalaŭr-ekzameno.

Same kiel la prezidanto de la Liberpenso, subskribu la petskribon.

Dum la lasta Kongreso de Sat-Amikaro en Seto, la bankedo de la Liberpenso-grupo t.n. "Victor Hugo" okazis tro fore de ni. Do, Alain Visseq trovis por ni restoracion en Seto, kaj tie ariĝis ok kunmanĝantoj laŭ la tradicio de la vendredo dirita sankta. Dankon Alain !

La Kongreso 2012 okazos verŝajne en la departemento Doubs (25370 Metabief).

Multnombre partoprenu kaj preparu belan bankedon internacian. Jes ! Fakte inter la 45 partoprenantoj en Pau ĉeestis unu italo kaj unu hispanino, kaj en Seto partoprenis unu italo.

Mi finas per « Hura por la liberpensuloj ! Hura por la ateistoj ! ».

Kaj kvar vortojn en Esperanto :

« Nek dio, nek mastro ! »

Henriko Graven'
Francujo

Regiona renkontiĝo *"frandaĵoj de laikeco"* en Livorno (Italujo, regiono Toskanujo)

La 21an de Januaro 2011 okazis, en la ĉefa placo de la urbo Livorno, publika manifestacio titolita "*frandaĵoj de laikeco*", lanĉita de la regionaj asocioj de UAAR (Unio de Ateistoj kaj Agnostikuloj Raciismaj).

Kvin budoj, la ĉefa centre de la placo, kaj la aliaj kvar ĉe la kvar anguloj de la krucvojo, kies deĵorantoj celis disdoni inform-materialon kaj konsciigi la urbanojn pri la kampanjoj de UAAR kontraŭ la entrudiĝo de la katolika Eklezio en la ŝtatajn leĝojn kaj en la vivon de la homoj, t.e. :

1) <u>la kostoj de la Eklezio</u>, nome kiom kostas la Eklezio al la Ŝtato (fakte al ni). La Eklezio ne pagas impostojn, nek pri siaj posedaĵoj nek pri siaj komercoj nek pri siaj konsumoj, kaj la Ŝtato (same la Regionoj kaj la Komunumoj) devas pagi la pensiojn por ĉiuj pastroj kaj iliaj familianoj, pagi la pastrojn kiuj agas en ŝtataj oficejoj (malsanulejoj, malliberejoj, policejoj, ktp), pagi la instruistojn de la religio (nepre katolika) en la ŝtataj lernejoj, doni monon al la katolikaj lernejoj, universitatoj kaj kuracdomoj, kontribui al la kostoj de la preĝejoj, ktp.

2) <u>la biologia testamento</u>, nome la ebleco antaŭdecidi rifuzon de medikamentoj aŭ de trud-nutrado, kiuj celas pluteni nin vivantaj, en la kazo kiam, pro gravega malsano, oni ne plu povus decidi.

3) <u>la laika moralo</u>, ekzemple la rajto libere uzi kontraŭkoncipilojn; la rajto al la artefarita fekundigo ; samaj rajtoj por katolikaj kaj laikaj geedziĝoj aŭ kunvivantaj paroj ; la rajto ricevi ne religian sed laikan asistadon je la fino de sia vivo ; la rifuzo elmontri la krucifikson en publikaj lokoj ; ktp.

4) <u>la privataj (katolikaj) lernejoj</u>, en kiuj la paroĥestro aŭ la



episkopo elektas la instruistojn laŭ sia plaĉo, ekster la oficiala meritlisto, pagas ilin (malmulte), sed la Ŝtato devas abunde kontribui.

5) la libera scienca esploro, ekzemple la rajto esplori pri la embriaj ĉeloj.

Nia loka klubo (de la urbo Carrara) elmontris kaj vendis ankaŭ libreton por infanoj (sed ne nur !), kiu estas la traduko de la germana origina versio, sed pri kiu mi eksciis danke al la esperanta versio kiu titoliĝas *"Kie ni povas trovi Dion ? demandis la eta porkido"*. Ni vendis dek du ekzemplerojn, sed nur du al la urbanoj.

La manifestacio, kiu estis bela okazo renkontiĝi kun la aliaj regionaj rondoj, ricevis malvarmetan akcepton de la loka popolo : kvankam Livorno estas sendube laika urbo, ateismo parade elmontrata vekas fremdecon kaj suspektemon. Nur unu ridetanta maljunulo, kiu puŝis malnovan



biciklon, fiere proklamis “*mi estas kun vi*”. La plejparto de la vojirantoj rapide trarigardis la budon, sed evitis paroli kun ni. Multaj alproksimiĝis al la budo se neniu estis deĵoranta en la proksimeco, kaj se iu alproksimiĝis ili malaperis. Deĵoranto elreviĝinta de nia budo iom troige asertis ke, se ni anstataŭ disvastigi informojn cele al vekiĝo de la konsciencoj, ni disdonus pri aidoso aŭ variolo, ni ricevus pli da sukceso.

La impreso estis, ke la vorto ATEO (*ateisto*) ĝenas, ke ili konsideras nin kiel alian pluan sekton. Mi aŭdis preteriranton, kiu grumblis “ *Mankis plu al ni nur ateistoj!*”.

Kial tiuj malkuraĝigaj sentoj en tiu urbo ? Laŭ mi, sed mi ŝatus ekkoni aliajn impresojn, ĉar ni tute eraris transsendi la mesaĝon.

La flavaj kaj nigraj flagoj, kun la vortoj “*Unione degli Atei …* ”, kiuj simbolas nian asocion, parade aranĝis niajn budojn sed ili ege vualis nian mesaĝon, kiu estis akceptebla de multaj. Ni batalas por la rajto pensi libere, por ne esti devigataj submetiĝi al neraciaj dogmoj, kiuj minacas kaj kondiĉas nian vivon. La bazaj laikaj valoroj de laŭjura Ŝtato estas sankciitaj de nia Konstitucio. Sufiĉas al ni, ke tiuj principoj estu respektataj, ni ne volas ateismigi la homaron.

Se ni volas, ke homoj komprenu la maljustecon kaj la senrajtajn entrudiĝojn de la Eklezio, ni devas eviti la personajn kontraŭstarigojn (ateisto-katoliko), kaj strebi al la laikeco. La laikeco kiel persona rajto kaj kiel devo de la Ŝtato.

Annarosa Andrei (Italujo)
la 12^{an} de Februaro, 2012

Pri la Dia Rajto de la Reĝo de la Reĝoj

La papiruso de Anio de la antikva Egiptuja *Libro de Mortintoj* diras ke Oziriso estas reĝo de la reĝoj. La kialo ke mi ne kredas en ideoj kiaj "la dia rajto de la reĝo de la reĝoj" estas ke tiajn ideojn nek klarigas nek antaŭvidas ajnaj observoj. Estas dirite ke ni bezonas reĝon ĉar ni alie ne povas rezoni, scii, aŭ havi socian kunteniĝon. Tamen, se necesas

reĝo al mi, kial ne necesus alia reĝo al la reĝo ? Krome, kial ne necesus ankoraŭ alia reĝo al la reĝo de la reĝo, ktp ? Estas ridinde kiam al reĝo necesas reĝo.

Antikva Grekuja mito diras ke Atlaso subtenas la planedon. Se Atlaso subtenas la planedon, kiu subtenas Atlason ? Ŝajnas al mi ke neniu subtenas la planedon. Ekologiaj problemoj tre malboniĝas. Ni havas troan loĝantaron. Mankas la reciklado de elementoj kiel karbono, fosforo, nitrogeno, kaj metaloj. Ni suferas ankaŭ la disvastigon de nukleaj armiloj en pli kaj pli da manoj, inter multegaj aliaj problemoj. Eble necesas opinii ke ni planedanoj ne ĝuas egalajn konsiderojn de interesoj, ĝuste ĉar ni ankoraŭ ne renversis la dian rajton de la reĝo de la reĝoj.

Peter J. Schweinsberg
Usono

P.S. La artikolo aperos ankaŭ ĉe mia paĝaro *ipernity.com*. Laŭ mi ankaŭ teistoj devus legi gazetojn kiel ATEOn.

Svisaj tranĉiloj

Vi certe scias, ke la svisa flago estas ruĝa kun blanka kruco en la mezo. Temas pri greka kruco, ĉiuj strekoj estas samlongaj. Temas pri kristana simbolo, konata fakto.

Sur objektoj produktitaj en Svislando ni havis siatempe arbaleston de Vilhelmo Tell. Nuntempe nia « marko » estas la svisa flago en formo de blazono : « *swissmade* ».

Tiu ĉi marko aperas inter aliaj lokoj sur niaj mondfamaj tranĉiloj. Nuntempe la firmao, kiu produktas la famajn tranĉilojn anoncas, ke ĝi devis prepari apartan stokon por Saud-Arabio ; sur la tranĉiloj destinataj al tiu lando ne aperas tiu oficiala marko. La kialo estas, ke Saud-Arabio rifuzas la tranĉilojn, se ili surhavas la kristanan krucon.

Mireille Grosjean
Svislando

http://mirejo3.blogspot.com

Alvoko al la tutmonda PACO ĉe :
www.alvoko-al-mondpaco.org

Kvar demandoj al la legantoj de *Ateismo* :

1/ En Francujo, leĝo ordonas en almenaŭ siaj du unuaj artikoloj la disigon de la ŝtato disde la eklezio sed la ŝtato donas multe da helpmono al la restaŭro de la religiaj preĝejoj. Do, same kiel la leonoj estas parto de la bestoj, ĉu la preĝejoj aŭ aliaj religiaj konstruaĵoj ne estas parto de la eklezio ? Mia vortaro klarigas ke la eklezio estas institucio sed ne bone klarigas kio estas institucio.

Kaj vi, ĉu vi havas difinojn pli klarajn ?

Cetere ĉu la ŝtato paganta tiujn restaŭrojn ne povas esti rigardata kiel ŝtelisto kaj ĉiuj religianoj kiuj uzas tiujn preĝejojn ankaŭ ŝtelistoj ? Ĉu ankaŭ la religianoj, kiuj tute laŭleĝe dekalkulas siajn donacojn al la eklezio el siaj impostoj, ne estus ankaŭ ŝtelistoj ? Ĉar kompreneble, multaj ateistoj rigardas la preĝejojn kiel verukojn, kaj ne komprenas ke aliuloj uzas parton de ilia imposto por restaŭri tiujn verukojn kiuj krome propagandas mensogojn.

Demando en la demando : konsiderante ke la franca ŝtato monhelpas la restaŭrojn de la preĝejoj, ĉu oni povas diri ke Francujo estas laika ?

2/ Kio estas la religio : ĉu nur iri en preĝejojn kaj adori iun dion (iujn diojn) ? ĉu ankaŭ apliki la preceptojn de la Libroj (Korano, Talmudo, Biblio, Nova Testamento ktp) en la ĉiutaga vivo. Kaj kiam la Libroj enhavas tekstojn kiuj kontraŭdiras la liberecon, kial ĉiam diri ke ĉiu respektu la religiojn.

3/ Kelkaj religiaj Libroj ordonas la mortpunon por tiu forlasasinta la koncernatan religion. Tio nomiĝas aposteco. Ĉu tiu nura fakto ne sufiĉus por rigardi la koncernatan religion kiel sekton ?

4/ La Liberpenso (kun majusklo) ne havas la saman signifon kiel la liberpenso (kun minusklo) ; efektive, la Liberpenso estas specifa asocio kun specifa propra statuto sed ofte oni vidas en la tekstoj la verkantojn uzi la vorton "liberpensulo" kvazaŭ "libera pensulo" aŭ "membro" de la Liberpenso. Ĉu ne estus necese ankaŭ ĉi-okaze meti la majusklon ĉe la vorto "liberpensulo" kiam temas pri membro de la asocio ?

Se vi havas respondon al unu aŭ pluraj el miaj demandoj, sendu al :

Ahado.michel@yahoo.com

... aŭ profitigu ĉiujn legontojn de la 15[a] numero. Mi antaŭdankas.

Michel Ahado
Francujo

Liberpensulo ricevas la malaperigon de sia bapto

Iu loĝanto de la departemento Manche (Francujo) ĵus obtenis de la tribunalo la kondamnon de la episkopo de Coutances kaj Avranches, ordonante la definitivan malaperigon de lia baptoakto el la paroĥaj registroj.

Naskita kaj baptita en 1940, en la urbo Fleury, li asertas ke li estas nun liberpensulo.

En 2001, li jam sukcesis surskribigi la mencion « *malagnoskis sian bapton* » kontraŭ sia bapto-akto.

Sed, verŝajne tio ne sufiĉis al li, ĉar li ankaŭ petegis, sen respondo, ĝian definitivan malaperigon.

La juĝisto de Coutances sin apogis sur la artikolo 9 de la civila Kodo kiu certigas la juran respekton de ĉies privata vivo. Li proponas la malaperigon de la akto « ekzemple per masko de la linio, helpe de neforviŝebla nigra inko ».

La episkopo de Coutances estas kondamnita ankaŭ pagi 1 200 € pro la justicaj elspezoj.

El la taggazeto ***Maine libre***. Vendredon, la 28[an] de oktobro 2011.

Jackie Huberdeau
Francujo


Neforviŝebla religia unua premo

Mia patrino naskiĝis en 1906. Kvankam iom malgranda, ŝia vilaĝo enhavis du lernejojn : la katolikan kaj la laikan. Ĉar ŝiaj gepatroj ne estis tre religiemaj mia patrino vizitadis la laikan, tamen kiel kutime en tiu epoko, ĉiuĵaŭde vespere ŝi partoprenis lernadon de la kateĥismo en la preĝejo.

Inteligenta kaj laborema, ŝi sukcese trapasis la ekzamenojn por fariĝi instruistino en tiu vilaĝo kie ŝi edziĝis kaj dufoje naskis. Mia

fratino kaj mi ofte aŭdis nian patrinon gurde rakonti kiom sep-aŭ-okaĝa ŝi abomenis la kateĥismon, kiom ĝisoste ŝin timigis la pastro kiam, balancante la brakon jen dekstren jen maldekstren samkiel horloĝo, per terura voĉo, li tondre skandis « ĉiam suferi ... neniam eliri ... ĉiam suferi ... neniam eliri », kompreneble aludante la inferon ! Tial, ekde sia infanaĝo, ŝi forlasis la religion kaj fariĝis ateisto. Laŭcele de sia tuta vivo, ŝi energie klopodis por kreskigi la laikan lernejon.

Kiam ŝi estis sepdekjara, unu el ŝiaj okuloj enhavis glaŭkomon ; oni nepre devis operacii post necesa anestezo. Laŭ la



oftalmologo, la operacio sukcesis, kaj ĉio glatis. Malgraŭ tia aserto, mi deziris tranokti apud mia patrino. Sed, meze de la nokto, mallaŭte mi aŭdis la patrinan voĉon preĝantan : « Mi vin salutas, Maria ... ». Rapide eliĝante, mi vidis strange pala mian patrinon kies senkoloraj lipoj apenaŭ moviĝante flustre daŭrigis la preĝon « Kaj jesuo ... ». Mi tuj helpvokis. La doktoro flustris : « gravas ke la tensio nenormale malaltas ». Kelkajn horojn poste, la flegistino trankviligis min : « la tensio fariĝis normala, nun la malsanulino serene ripozas ». Kompreneble, pri tio, ĉiam mi silentis por ke mia patrino neniam sciu kiajn nekredeblajn parolojn ŝi diris dum sia sveno.

Tiu persona sperto profunde skuis min. Malagrabla sento min invadis, kaj mia patrino faris preskaŭ honton al mi kvazaŭ forviŝante siajn intimajn konvinkojn. Tamen, tiu aflikta periodo ne longtempe daŭris, ĉar rapide mia patrino retrovis sian antaŭan pensmanieron ... Kaj plurajn jarojn poste, laŭ ŝia propa volo, senreligie ni enterigis ŝin.

La stranga deliro de mia patrino miajn okulojn malfermis pri la neforgesebla vundeblo de juna cerbo. La unuaj religiaj principoj subpremas la konscion aŭ la subkonscion de la infanoj, tiom forte ke, post traŭmato, sveno, komato ... la maljunulaj aŭ la malsanulaj nekredantoj povas piule aspekti kiel mi atestas. Gravas ĉar ties familianoj aŭ kuracistoj eble opinias ke finfine la religia kredo estas retrovita. Cetere, kiom da ateistoj estas enterigitaj tute malprave laŭ religiaj ceremonioj ?

Josiane Ferrand

Francujo

La Ovo

Vi estis revenanta hejmen, kiam vi mortis.

Temis pri aŭtokolizio. Io ne tre rimarkinda, sed ĉiukaze mortiga. Vi lasis edzinon kaj du filojn. Estis sendolora morto. Kuracistoj strebadis savi vin, sed vane. Kaj cetere, via korpo estis tiel

disiĝinta, ke estis pli bone ĉi tiel, kredu al mi.

Kaj tiam, vi renkontis min.

"Kio, kio okazis ?" vi demandis. "Kie mi estas ?"

"Vi mortis", mi diris, rekte. Indis paroli klare.

"Mi vidis... kamionon, kaj mi subite..."

"Jes", mi diris.

"Mi... mi mortis ?"

"Jes. Sed ne tristu je tio. Ĉiuj mortas", mi diris.

Vi ĉirkaŭrigardis. Estis nenio ajn, nur vi kaj mi.

"Kie ni estas ?" vi demandis. "Ĉu estas ia posta vivo ?"

"Pli-malpli", mi diris.

"Ĉu vi estas dio ?" vi demandis.

"Jes", mi respondis, "Mi estas Dio".

"Miaj filoj ... mia edzino", vi ekdiris. "Kio pri ili ? Ĉu ili plu vivos bone ?"

"Jen kio plaĉas al mi," mi diris. "Vi ĵus mortis, sed via unua zorgo estas via familio. Tio estas tre bona".

Vi fascine rigardis min. Al vi, mi tute ne aspektis kiel Dio. Mi havis aspekton simple viran. Aŭ eble virinan. Eble kiel iuspeca aŭtoritatulo pli simila al bazlerneja instruisto, ol al ĉionpovulo.

"Ne zorgu", mi diris. "Ili fartos bone. Viaj filoj memoros vin perfekta, ĉiel ajn. Ili ne havis tempon por eksenti malaprobon al vi. Via edzino multe ploros, sed interne ŝi sentos malstreĉon. Honeste, via geedziĝo estis detruiĝanta. Se tio konsolas vin, ŝi sentos grandan kulpon je sia malstreĉo".

"Ho", vi diris. "Do kio okazas nun ? Ĉu mi iros al la paradizo, aŭ la infero, aŭ io simila ?"

"Nek nek !" mi diris. "Vi reenkarniĝos."

"Ha", vi diris. "Do la hinduoj pravis".

"Ĉiu religio pravas siamaniere", mi diris. "Promenu kun mi".

Vi akompanis min, dum ni trairis la neniecon. "Kien ni iras ?"

"Nenien, vere", mi diris. "Estas bele promeni dum ni parolas".

"Do, kiu estas la fina celo ?" vi demandis. "Kiam mi renaskiĝos, mi havos blankan paĝon, ĉu ne ?

Mi estos infano. Do ĉiu mia sperto de mia lasta vivo ne plu gravos".

"Tute ne !" mi diris. "Vi jam havas ĉiujn konojn kaj spertojn de viaj antaŭaj vivoj. Vi simple ne memoras ilin ĝuste nun."

Mi haltis kaj prenis viajn ŝultrojn en miaj manoj.

"Via animo estas pli granda, bela, kaj majesta, ol vi povas imagi. Homa menso povas nur teni etan frakcion de tio, kio vi estas. Estas kiel meti fingron en akvoglason por senti, ĉu la akvo estas varma aŭ malvarma. Vi metas etan parton de vi en la ujon, kaj kiam vi reprenas ĝin, vi gajnas ĉiun sperton, kiun ĝi enhavis.

"Vi estis homo dum la lastaj 48 jaroj, do vi ankoraŭ ne disstreĉiĝis por eksenti la ceteron de via senfina konscio. Tamen se ni restus ĉi tie sufiĉe longe, vi ekmemorus ĉion. Sed ne estas kialo por fari tion inter ĉiu vivo."

"Kiom da fojoj mi reenkarniĝis, do ?"

"Ho, multajn. Multajn, kaj eĉ pli multajn. Kaj en multajn malsamajn vivojn", mi diris. "Ĉi-foje, vi estos ĉina kamparana knabino en la jaro 540 p.K."

"Kio, kio ?" vi ekdiris. "Ĉu vi sendos min al pasinteco ?"

"Nu, mi supozas ke jes, teknike. Tempo, kiel vi ĝin konas, ekzistas nur en via universo. Aferoj estas malsamaj tie, de kie mi venas."

"De kie vi ... venas ?" vi diris.

"Nu jes", mi klarigis. "Mi venas de ie. Ie alie. Kaj estas aliaj kiel mi. Mi scias ke vi volas scii pli, pri kio temas, sed sincere, vi ne komprenus."

"Ho", vi diris, iom trista. "Sed, se mi reenkarniĝis en aliaj lokoj kaj tempoj, eble mi renkontis min mem iam."

"Ha jes, certe. Tio okazas oftege. Kaj pro tio ke ambaŭ vivoj nur konscias pri si mem, vi eĉ ne rimarkis la okazon."

"Do kiu estas la fina celo ?"

"Ĉu vere ?", mi demandis. "Ĉu vere ? Vi demandas al mi pri la celo de vivo ? Ĉu tio ne estas iom kliŝa ?"

"Nu, estas akceptebla demando", vi insistis.

Mi rigardis vin en la okulojn. "La celo de vivo, la kialo, kial mi konstruis ĉi tiun tutan universon, estas por ke vi maturiĝu".

"Ĉu vi celas la homaron ? Vi volas ke ni maturiĝu ?"

"Ne, nur vi. Mi konstruis ĉi tiun tutan universon por vi. Per ĉiu nova vivo, vi kreskas kaj maturiĝas kaj vi fariĝas pli granda, pli bona intelekto".

"Nur mi ? Kaj kio pri ĉiuj aliaj ?"

"Estas neniu alia", mi diris. "En ĉi tiu universo, estas nur mi kaj vi".

Vi rigardis al mi strange. "Sed ĉiu homo en la tero ..."

"Ĉiuj vi. Malsamaj enkarniĝoj de vi."

"Atendu. Ĉu mi estas ĉiuj ?"

"Nun vi ekkomprenas !", mi diris, kaj gratule frapetis vian dorson.

"Ĉu mi estas ĉiu ajn homo kiu iam ajn vivis ?"

"Aŭ vivos, jes."

"Ĉu mi estas Abraham Lincoln ?"

"Kaj vi ankaŭ estas John Wilkes Booth", mi aldonis.

"Mi estas Hitler ?" vi diris, kun teruro.

"Kaj vi estas la miliono da homoj, kiujn li mortigis."

"Mi estas Jesuo ?"

"Kaj vi estas ĉiu, kiu lin sekvis".

Vi eksilentis.

"Ĉiun fojon, je kiu vi dolorigis iun, vi dolorigis vin mem. Ĉiun komplezon, kiun vi faris, vi faris al vi mem. Ĉiuj feliĉaj kaj tristaj momentoj, iam ajn pasigitaj de iu ajn homo, estis, aŭ estos, pasigitaj de vi."

Vi iom longe pensumis.

"Kial ?", vi demandis al mi. "Kial ĉi tio ?"

"Ĉar iam, vi fariĝos kiel mi. Ĉar tiel vi estas. Vi estas samspeca al mi. Vi estas mia filo."

"Hu !", vi diris nekredeme. "Ĉu vi celas, ke mi estu dio ?"

"Ne, ankoraŭ ne. Vi estas feto. Vi plu kreskas. Kiam vi estos vivinta ĉiun homan vivon en ĉiu tempo, vi estos kreskinta sufiĉe longe, por naskiĝi."

"Do, la tuta universo", vi diris, "estas nur ...".

"Ovo", mi respondis. "Kaj nun estas tempo, por ke vi iru al via venonta vivo."

Kaj mi sendis vin tien.

Andy Weir

Elangligis Manuel Giorgini

Origina titolo "The Egg".

http://galactanet.com/oneoff/theegg_mod.html

Kiel ni, ateistoj, financas moskeojn

Kiu scias ke, en Francujo, 1,1 miliardoj da bestoj estas buĉataj ĉiujare ? Budĝeto : 5,5 miliardoj da eŭroj !

Inter 1/3 kaj 2/3 de la viando konsumata en Francio estas halala aŭ koŝera. Sed nur 1/10 de la loĝantaro estas juda aŭ islama.

- al 50% de la ŝafoj oni dum ilia vivo tranĉas la gorĝon ;
- 90% de la bovidoj havas la saman sorton.

Kiel oni buĉas halale kaj koŝere ?

Ekzemple bovo (500 kg), estas alkroĉata per kateno, ĉirkaŭ malantaŭa kruro, kaj la kapo estas alkroĉata per la nazo, en la direkto de Mekko aŭ de Jerusalemo (laŭ la rito islama aŭ juda). Tio daŭras du ĝis kvin minutojn.

La gorĝo estas tranĉata dum la besto estas plene konscia. Tion postulas kaj la islama kaj la juda religioj.

Tiu sovaĝa maniero buĉi la bestojn kreskas je 15% ĉiujare.

Kial ?

- ĉar tio signifas ŝparon de 50 € kompare kun pli humana tekniko ;
- ĉar je ĉiu kilogramo da viando buĉita halale, dek ĝis dek kvin centimoj estas pagitaj al la moskeo !! (Kabel Leblan, rektoro de la Moskeo de Liono, en Francujo)

La kvin buĉejoj de la pariza regiono buĉas laŭ halala tekniko, ĉar … ĝi malmulte kostas !

Eĉ viando produktita biologie povas esti halala !

Konklude :
MANĜU VEGETARE !!

Jean MARIN
jmarin_93@hotmail.com

"Kiel ateistoj trovas signifon en la vivo ?"

La demandanto kondutis maldelikate : "Kial vi ateistoj ne iru mortigi vin mem ĝuste nun ?"


Prave, plejparto da kristanoj uzas pli ĝentilan formulon, sed ateistojn regule informas iu speco da kredantoj ke nia vivo ne povas

valori se ni ne kredas je ilia Dio. Kial fine, ili demandas, oni estu afabla aŭ amoplena, zorgema pri suferado, aŭ entute aktiva, se iun tagon ni simple mortos ?

Estas vere, ke sen dia plano, niaj vivoj ne havas ekstere difinitan celon. Persono ne naskiĝas kun la celo fariĝi kuracisto, aŭ krei spektindan artaĵon, aŭ fosi puton en Afriko. Sed ĉu la malsanuloj kuraciĝas malpli bone, ĉu la plezuro de artemuloj estas malpli intensa, aŭ ĉu la soifo de la vilaĝanoj estas malpli senigita, simple ĉar tiu persono decidis trovi celon por si mem, anstataŭ sekvi ordonon de la ĉielo ? Ĉu ni vere bezonas, ke diaĵo diru al ni ke indas pasigi propran vivon pli je kuracado de kancero ol je ĝis-svena trinkado ?

Kial ni ne devus trovi kontenton en la mildigo de suferado aŭ de maljusteco, simple pro tio ke ni ĉiuj iam mortos ? La nura fakto, ke ni havas nur ĉi tiun vivon, eĉ pli gravigas, ke ni faru ĉion eblan por malpliigi la suferon, kiun malriĉeco, malsaneco, maljusteco kaj senscio kaŭzas. Diri, ke tiu provo estas sensignifa, estas same kiel diri ke evitebla suferado ne vere gravas ; tiu sinteno estas ne vere morala.

Multaj kristanoj efektive asertas ke ne estas kialo por zorgi pri aliaj se ne ekzistas Dio. Sed ĉi tiu estas fakte religia aserto, venanta de la teologia koncepto de origina peko, laŭ kiu la homaro estas korupta. Ni povas sekure ignori ĝin, ĉar ni ne vere bezonas infanecajn rakontojn pri eterna rekompenco aŭ damno por emigi nin al bono : priserĉado



montras ke la malplej religiaj socioj suferas plej malofte sociajn problemojn, inter kiuj krimo kaj perforto. Sanaj homoj posedas empation, kaj la klarigo je tio kuŝas en psikologio kaj evolua biologio : dioj ne necesas.

Vivo ne povos esti sensignifa, dum ni kapablos influi bonfarton nian kaj aliulan. Por vera sensignifeco, ni bezonus paradizon.

En tia stato de ĉiama, perfekta bono, kia aperas en la difino de paradizo, neniu ago povus havi ŝanĝan efikon. Se la ago plibonigas, do la antaŭa stato ne povis esti perfekta. Se ĝi malplibonigas, la rezulto ne estus perfekta. En la paradizo, ambaŭ aferoj ne eblas. Eĉ rekuniĝo al viaj karuloj ne povus aldoni al via, aŭ ilia, feliĉo, ĉar paradizo, laŭdifine, estas loko de neplibonigebla feliĉo.

Konsideru dum momento la inferan sensencecon de paradizo. Almenaŭ en nia reala ekzisto, niaj agoj havas efikon, ĉu bonan, ĉu ne, kaj tial indas provi por agi ĝuste. Kaze de eterna vivo, dum kiu ni neniel efikas, estus tute same kiel jam esti morta.

Se vi iam ajn asertis, ke via vivo ne estas signifa sen via fido en Dio, ĉu vi vere kredas ke viaj familianoj kaj amikoj estas mem tute senvaloraj ? Ĉu vere vi ne trovus indecon je protekto kaj varto de viaj infanoj, sen promeso de eterna vivo ?

Se vi vere tiel pensas, do vi, kaj ne ateistoj, senmoraligas la homaron, kaj Kristanismo, ne ateismo, malpliigas la veran valoron kaj signifon de vivo. Ni ateistoj trovas celon en tia mondo, kia ĝi estas, kaj en niaj veraj vivoj ; ni vidas vivantaĵojn kiel valorajn en si mem ; ili meritas nian zorgon kaj kompaton simple ĉar ili havas nian saman kapablon senti doloron kaj plezuron. Estas malfacile imagi malpli moralan, malpli empatian sintenon, ol tian interne fuŝan kaj senkompatan vidon de la homaro, kian Kristanismo proponas.

Tiu ja estas perversa vido de realeco. Efektive, se la nura valora eco de ekzisto estas, ke Dio donis

ĝin al ni, do tio devas signifi ke la donaco ne vere havas valoron en si mem. La kreaĵo de Dio estus kiel iu fuŝkolora, senforma pulovero kiun vi neniam ajn surmetus, sed kiun vi ne sukcesas forĵeti ĉar ĝi estis donaco de via avino. Ĉi tiu vidpunkto efektive diras ke vi estas dankema je la donaco de Dio, sed vi ne vere multe ŝatas ĝin ; kaj se ne estus pro via kredo, ke vi pasigos eternan vivon en paradizo kiel rekompencon je via tolerado de ĝi, vi ne povas imagi kialon por eĉ voli ĝin dekomence.

Teisma religio reduktas vivon al io kio ne havas valoron krom kiel kreitaĵo de imagita dieco. Ĝi dekretas ke celon kaj signifon oni trovas, nur kiam oni sentas sin pupo de tiu dieco, sen iu ajn celo krom ties celo, kaj neniu valoro, krom kiel ties kreaĵo. Teisma religio rigardas ĉion, kio plej bonas kaj plej noblas pri la homaj impulsoj kaj bravaĵoj, kaj konsideras ilin sensignifaj kaj senvaloraj — aŭ pli bone : koruptaj — se ne faritaj je la nomo de Dio. Venis tempo forlasi ĉi tiun senbazan mondovidon. Venis tempo malakcepti teisman religion kaj ekrigardi nin kaj aliajn per vera digneco, kiel estaĵojn kun interna valoro, kaj ne nur kiel torditajn ombrojn de fikcia kreinto.

http ://www.washingtonpost.com/blogs/on-faith/post/how-do-atheist-find-meaning-in-life/2012/01/18/gIQAbiFP8P_blog.html

Paula Kirby
elangligis Manuel Giorgini

Kiel plenigi la truon ?

“Mi scias, kio estas ĝusta, do aŭskultu min.” Tia estas la tipa tono de ĉiuj religiaj gvidantoj. Se la papo asertas, ekzemple, ke abortigo estas malbona, li ne bezonas pravigi sian opinion. Sufiĉas, ke li diras tion, kaj milionoj da katolikoj ĉirkaŭ la mondo aŭskultas kaj adoptas lian opinion kiel propran. Religiaj moralaj principoj kutime estas esprimitaj en la formo “Faru tion” aŭ (pli ofte) “Ne faru tion”. Sen pravigoj.

En la pasinteco, religiaj gvidantoj estis tiuj, kiuj havis la taskon pensi pri moralaj

problemoj, instrui ilin al infanoj, kaj prezenti ilin ĉiusemajne al la publiko, kiu ne havis grandan elekton krom ĉeesti kaj vole-nevole aŭskulti. Ankoraŭ nun, kiam necesas fari moralan deklaron, pro daŭra tradicio oni emas supozi, ke religiaj gvidantoj estas la plej taŭgaj homoj por fari tion. Ne ekzistas aliaj homoj, kiuj ĉiutage kaj profesie pripensas kaj debatas moralajn problemojn, krom eventuale filozofoj, kies cerbumaĵoj tamen estas tro intelektaj kaj abstraktaj por atingi vastan publikon.

Kvankam mi mem neniel bedaŭras la malkreskantan influon de religio en nia moderna mondo, mi estas devigata konstati, ke ĝia malapero postlasas truon, almenaŭ kiam temas pri morala instruado. Neniu instanco formale transprenis ĝian rolon pensi kaj deklari pri tiaj aferoj. Nuntempe la ĉefa forumo por moralaj debatoj estas la amaskomunikiloj. Kiam oni konsideras demandon, kiu havas moralan dimension, ekzemple ĉu la mortkondamno estas pravigebla, oni renkontas en la gazetaro kaj televido la argumentojn por kaj kontraŭ, kaj tio helpas onin formi propran opinion. Kontraste kun la iamaj religiaj gvidantoj, la modernaj komentistoj ne havas absolutan senbazan aŭtoritaton. Tial ili esprimas siajn principojn en la formo de opinioj, ne de neŝanĝeblaj faktoj.

Kvankam ne plu eblas aserti opiniojn per la sama aŭtoritata tono kiel pastro aŭ imamo, ni povas konsenti, ke ekzistas kelkaj bazaj valoroj. Certe ni ankaŭ konsentas, ke estas grave transdoni tiujn bazajn valorojn al la posta generacio. Tamen, nun kiam ni ne plu senpripense akceptas la malnovajn ideojn, ni ankaŭ devas demandi nin, precize kiajn regulojn ni volas transdoni. Ĉu eblas ankoraŭ konsideri la Dek Ordonojn kiel bazon de moderna morala sistemo ? Mi dubas. Pluraj el tiuj ordonoj kompreneble ankoraŭ validas, precipe “Ne mortigu” kaj “Ne ŝtelu”, sed aliaj fariĝis malpli gravaj aŭ tutsimple ne plu estas akceptataj.

Samtempe ekvalidas novaj valoroj, pri kiuj la homoj ne pensis en la epoko de la Dek Ordonoj

antaŭ 3000 jaroj. Nuntempaj fundamentaj moralaj principoj estas jenaj : ke oni ne kaŭzu doloron al aliaj, ke oni respektu ĉiujn homojn sendepende de raso aŭ sekso, ke oni respektu la naturan vivon kaj la planedon sur kiu ni vivas.

Kiel do transdoni tiajn principojn al infanoj ? Iam, oni prezentis ilin en preĝejoj kaj aliaj religiaj centroj, aŭ dum lecionoj pri religio en la lernejo. La fakto, ke oni ne plu havas (aŭ prefere ne havu) lecionojn de religio, ne signifas, ke ni ne plu instruu tiujn normojn. Sed nun tio devus fariĝi la tasko de ordinaraj instruistoj, ne de religiaj gvidantoj.


Eĉ pli influa ol rekta instruado estas kaj ĉiam estis la prezentado de tiaj valoroj en infanlibroj, filmoj kaj simile. Kompreneble, en nia cinika moderna socio, ni ne plu bonvenigus tiujn terure moralajn rakontetojn, per kiuj oni turmentis infanojn en la 19ª jarcento ! Tamen multaj popularaj infanlibroj ja antaŭsupozas kaj prezentas tiujn bazajn valorojn, ekzemple la libroj de Roald Dahl aŭ la serio Harry Potter. Tiaj libroj, eĉ nekonscie kaj preterintence, kontribuas al la formado de morala sento ĉe infanoj kaj gejunuloj.

Estas des pli grave instrui tiujn fundamentajn valorojn al infanoj, ĉar bedaŭrinde la socio en kiu ni vivas baziĝas sur la principoj de la merkata ekonomio. Tiuj estas principoj bazitaj sur serĉado de persona profito, alivorte de egoismo. Tio ne estas bona fundamento por morala sistemo. Krome necesas mencii la fakton, ke cinikismo fariĝis laŭmoda en artaj rondoj. Filmoj prezentas ambiguan aliron al la sociaj normoj, tiel ke la spektantoj povas simpatii pli kun krimulo ol kun la leĝo, kaj eĉ la heroo povas konduti malice kaj esti aplaŭdata de la publiko. Tio estas en ordo por plenkreskuloj, sed donas danĝeran mesaĝon al gejunuloj, kies kompreno pri moralaj principoj ankoraŭ evoluas.

Ĉiuj moralaj veroj kompreneble havas esceptojn : ekzemple ekzistas okazoj en kiuj ankaŭ mensogado, ŝtelado aŭ eĉ mortigado povus esti pravigeblaj.

Debatado pri tiuj okazoj devus havi seriozan rolon en la lernejo, almenaŭ inter pli aĝaj lernantoj. Se oni ne plu dediĉas lecionojn al religio, oni ankoraŭ bezonas lecionojn pri "filozofio" aŭ "etiko" aŭ simila titolo. (Kaj cetere, lecionoj dediĉitaj al pensado kaj debatado estas utilaj ankaŭ alimaniere : lerni kiel prezenti kaj taksi argumentojn estas grava kapablo en si mem, kiun ĉiuj bezonas.) Moralaj valoroj estas same esencaj por bone funkcianta socio kiel kompreno pri matematiko.

Anna Löwenstein
Italujo



Ateismo

organo de ATEO

Ateista Tutmonda
Esperanto-Organizo

Bonvolu sendi viajn artikolojn al : christian.riviere@laposte.fr

Por informoj : **Anna Löwenstein**,
via del Castello, 00036 Palestrina, Italujo
anna.lowenstein@esperanto.org

Prezidanto: **Christian Rivière**, Francujo
Vicprezidanto: **Dominique Simeone**, Francujo
Sekretario: **Anna Löwenstein**, Italujo
Kasisto: **Dieter Rooke**, Svislando
Estrarano: **Yamasaki Seiko**, Japanujo

Jarkotizo : 15 € por A-landoj
10 € por B-landoj

*Konto **ateo-y** ĉe UEA*